

Gravaj dokumentoj, pri verdaj rezultoj, okazajhoj, rilato inter la Verdaj Partioj kaj Esperanto

Estus bone se samideanoj el diversaj landoj sendu la raportojn pri siaj Verdaj Partioj. Mi petas pardonon, ke la elekto estas iom hazarda, kaj chefe temas pri Europo.

Se vi estas membro de verda movado (en senco de Verdaj Partioj) kaj ghis nun ne estas membro de AVE bonvolu sendi ret-mesaghon al la sekretario de AVE: AVE@verduloj.org

Gravas scii kiom ni estas.

= = =

2022-06 **Verduloj havos pli fortan signifon en Australio**

Trevor komentis pri la rezultoj de la Verda Partio en Australio:

La ciferoj pri elektorezultoj en Aŭstralio estas iom misgvidaj.

La verduloj gajnis 4 lokojn en la deputita cxambro. ALP gajnis pli ol duonon, kaj do ne dependas de la apogo de verduloj.

Sed en la "supra cxambro", la senato, verduloj gajnis 12 lokojn el 76 kaj tie la nova registaro devas ricevi la voĉojn de la verduloj.

Estis la plej bona rezulto gxis nun por verduloj, kaj tuta aro da sendependulinoj (kiuj normale estus Liberalulinoj, t.e., konservativuloj)

elpusxis Liberalulojn -- cxar la antaŭa registaro rifuzis serioze trakti klimatan sxangxigxon.

Entute ni povas atendi, ke fine Aŭstralio faros ion seriozan pri tiu problemego.

Samideane, Trevor

2022-06 **Verduloj havos pli fortan signifon en Australio**

Okaze de naciaj elektoj en Majo rezultis 12 seghoj por Verduloj kaj 25 por Socialdemokratoj (Labour). Tio signifas ke Labour ne povos regi sen subteno de Verduloj; kaj ili postulas rezigni pri novaj minejoj de karbo kaj ankaŭ pri ter-gaso (metano).

La Verduloj gajnis ankaŭ kelkajn seghojn en regionalaj parlamentoj. Krom la Verduloj ankaŭ la liberalaj pro-klimataj „Teals“ gajnis seghojn.

Ghenerale ambau postulas shanghi la elekto-sistemon, lau brita modelo „La gajnanto rievias chion“.

Ili postulas pli demokrata maniero prezenti diversajn vidpunktojn en la parlamentoj.

<https://www.greeneuropeanjournal.eu/a-turning-point-for-australia/>

= =

2023-06-08/11 **Global Greens Congress en Incheon, 34 km sude de Seoul**

Lingvoj de la Kongreso de Tutmondaj Verduloj - aktuala oferto (en, es, fr):

<https://globalgreens.org/korea-2023/>

Finfine realighas la longe atendata kongreso. La antaŭa estis 2017 en Liverpool, kie AVE partoprenis.

Chi-foje ni denove tradukos la plej novan charton en Esperanton - jen la ligilo al la charto en 16

lingvoj, inter la araba ghis la svahila - inkluzive de Esperanto (versio de 2012):

<https://globalgreens.org/about/charter/>

Nun mi petas vin chu vi ...

- (eble) partoprenos kiel delegito de via partio

- pripensas partopreni kadre de inform-agado de AVE

- havas realigeblan ideon pri nia kontribuo, ekz-e: labor-sesio pri lingva egaleco inter la Verdaj Partioj

= =

2022-05-07 **Sukcesaj Verduloj en Grand Britio**

dum elekto por komunumaj konsilioj la majoritata konservativa partio malgajnis seghojn, la laborista, verdula kaj liberalaj partioj gajnis seghojn.

- -

2022-05 **Informo en Esperanto-Wikipedia pri la franca Verda Partio EELV**

jen la ligilo - koran dankon al Bastien:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Eŭropo_Ekologio_La_Verduloj_\(Francio\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Eŭropo_Ekologio_La_Verduloj_(Francio))

= =

2022-04-10 Yannick Jadot de la franca Verda Partio EELV ricevis 4,6%

Je la unua baloto 2022 por prezidento en Francio la kandidato de EELV, Yannick Jadot, ricevis 4,6% - char estis multaj kandidatoj tio estas ne malbona subteno. Imagu ke la kandidatino de Republikanoj ricevis nur iomete pli.

Feliche en Francio finfine estis elektita prezidento Macron, kiu subtenas la europan kunlaboron kaj ankaŭ la sendependecon kaj liberecon de Ukrainio.

Aliflanke estas manko de demokratio se nur malmultaj civitanoj uzas sian rajton elekti la regantojn (prezidenton kaj parlamenton).

Problemo estas la elekto-sistemo, kaj ke multaj homoj opinias ke la politikistoj ne zorgas por ili.

Intertempe jam en pluraj metropoloj de Francio estas verdaj urbestroj.

Jen la retejo de la Esperanto-Komisiono de EELV: <https://esperanto.eelv.fr/>

Pri EELV en Esperanto: <https://eo.wikipedia.org/wiki/E>

%C5%ADropo_Ekologio_La_Verduloj_(Francio)

--

2022-04-29 sendependaj Verduloj en Norda Makedonio

Je la elektoj de lokaj konsilioj kaj urbestroj ili gajnis kelkajn seĝojn. Ili chefe kampanjis por ekologiaj temoj.

<https://www.greeneuropeanjournal.eu/what-explains-green-independent-candidates-breakthrough-in-north-macedonia/>

--

2022-01 Jhurnalo de Europaj Verdaj Partioj en 28 europaj lingvoj

La aktuala temo estis resilienco - do, esti preta alfronti hazarde venantajn defiojn au katastrofojn.

<https://www.greeneuropeanjournal.eu/languages/>

--

2022-01-04 EU devas zorgi por pli bona ripareblo de elektronikaj aparatoj

Tro ofte okazas ke sufiche bona aparato pro iu malgranda difekto estas ne plu (malbone) riparebla surloke, kaj tial oni devas meti ghin al reciklado.

La Frakcio de Verduloj kaj Regionalistoj en la Europa Parlamento lanchis peticion al la EU-Komisiono.

La celo estas ke en tuta EU necesas scii pri la riparebleco de aparatoj antaŭ la acheto. Do, simile al informo pri energio-efikeco necesas tia indico.

Ili ankaŭ mencias la avangardan reguligon de Francio: <https://www.indicereparabilite.fr/>

Kompreneble tio estus modelo por la tuta mondo.

La peticio nuntempe estas traduktita en 7 lingvojn inter la hispana kaj finna - bedaurinde ankoraŭ mankas la slavaj.

<https://act.greens-efa.eu/repairscore>

--- fino